

# BULGARA ESPERANTISTO

**Organo de Bulgara Esperantista Asocio**


Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado per cirkulero № 1870 de 27. j. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro,  
Adreso: SOFIA, poŝtkesto 233

**Jaro XV**

**Majo-Junio 1934**

**№ 9-10**



**ĤRISTO BOTJOV, poeto-revoluciulo**

## Christo Botjov (1848-1876)

La 3-an de junio ĉiujare la bulgara nacio festas la gloran morton de sia fama poeto Ĥristo Botjov, kies vivo estas tuta epopeo.

Botjov, tiu estas la plej granda figuro, kiun dum la epoko de la renaskiĝo povis doni nia popolo. Vera homo, revoluciulo kaj poeto, li aperas kiel antaŭulo de la libero ĉe ni.

Naskita ĉe la piedoj de la majesta Balkano, nutrita en ĝiaj gigantaj montoj, li siatempe forlasas la sklavigitan de turkoj Bulgarujon, studas en Rusujo kaj sin dediĉas al revolucia agado en libera Rumanujo. Infektita de la ideoj sociaj movadoj de tiu epoko — la tempo de la vera spirita kaj intelekta renaskiĝo, kiu jetis en la mondon amason da novaj filozofiaj, moralaj, politikaj kaj socialaj ideoj, multajn novajn solvojn kaj kredon en la renovigo de l' homaro, — Botjov dum sia tuta vivo tuŝis en siaj verkoj tutmondajn problemojn kaj tuthomajn komprenojn.

Juna, flama temperamento, dotita je kapablo kaj energio, volo, forto kaj beleco, li ekstaras kontraŭ la tiama apatio kaj burĝa moralo. Li estas ribelanto, nova homo por sia tempo, revoluciulo de l' spirito. Li estas tute sindona al la ideo por popola liberigo, mirige konsekvenca en siaj konvinkoj — lia tuta vivo estis entuziasma sopiro al batalo, plene vivita ĝis la fino, por la triumfo de vera homeco, de surtera justeco.

La 29 Majo 1876 Botjov heroe transpasas kun sia 200-membra bando per la aŭstra-hungara ŝipo „Radecki“ la liman Danubon kaj surpaŝas la gepalran bordon apud vilaĝo Kozluduj. De tie li direktiĝas al la Balkano, kie, post kelktagaj bataloj kontraŭ turka armeo, li falas frapigita de malamika kuglo sur la monto „Vola“, apud Vratca.

Lia heroa morto elradias teruran, tragedian bravecon, sed la radiluma aŭreolo de Botjov estas antaŭ ĉio en lia poeta verko. Li estas la plej granda reprezentanto de la artista penso ĉe ni, la klasikulo de la bulgara literaturo. En liaj senmortaj verkoj vivas la mirinde bela bulgara lingvo en ĉiuj siaj nuancoj, mu-

ziko kaj tremo — plena rebrilo de la nacia spirito. Ne multajn, nur dudekunu versaĵojn li donis al ni, sed ĵveraj perloj ili estas. „Ĥajduti“, „Adiaŭ“, „Ĥaĝi Dimitro“ k. a.\*) ĝis nun neniu poeto re-skribis kaj la tuta popolo scias parkere. Se la stilo estas la homo, Botjov estas la plej granda, la plej perfekta stilisto de la gepatra parolo.

Ankaŭ nun, la heroaĵo kaj la verkaĵo de Botjov, ornamitaj per senmorteco kaj laŭroj, brilas per granda potenco kaj estas fiera batalflago, al kiu celis nia popolo ĉe la alvoko al socia ordo, surtera justo kaj homa libero!

Ankoraŭ estas viva li, ĉar „kiu falas en batalo por libero, tiu ne mortas“, kaj longe kaj eterne la nomo de Botjov super ni kiel stelo brilados, kvazaŭ idealo de la junularo.

I. H. K.

\*) Ili aperis en aparta libreto „Versaĵoj de Botjov“, trad. Iv. Dobrev.

### Nia kanto

Post longa vintro venas ja printempo...  
Post longa dormo homa kor' vekigis —  
Sur nia ter' alvenas nova tempo:  
Infano ĉarma de la pac' naskigis..

Infano kara = lingvo Esperanto —  
Prediko sankta al la tuta mondo;  
Mirinda akvo por la soifanto —  
Kreanto de amplena frata rondo...

Infan' iama jen elkreskis viro,  
Senhalte vicis li sur vasta tero  
Kaj kiel paca batalant'-martiro  
Triumfas ĉiam en fratec' kaj vero.

Vivanta estas li, kaj ne simbolo —  
Anim' homara estas lia domo,  
Per li fariĝas volo unu volo,  
Per li fariĝas homoj unu homo...

Sim. M. Sim.  
Sofio

Pencho Slavejkov

**El „Songo pri felico“**

Miajn la printempesperojn  
Milde suno ne karesis —  
Kora revo pri somero  
Vivi denaskiĝe ĉesis...

Al kamparo mi forportis  
ilin — mondon ne vidintaj —  
Vent' ilian tombon kovris  
Per floraĵoj velkiĝintaj.

1926 Tradukis: *Teo Kamengradski*

\* \* \*

En nuda val'... Sen hela ĝoj'  
Vagadas mi senfine...  
Faletas mi. Obskuras voj',  
Sed iras mi obstine...

Je ĉiu paŝ' rikanas jen  
Mortinto — la juneco...  
Terura trem'! Kaj forta ĝem'  
Kaj plena senhelpeco...

En nuda val'... Sen hela ĝoj'  
Mi vagas laŭdestine...  
Sensuna viv'. Senflora voj'.  
Lamentas mi senfine...

Subita kri'... Nenia val' —  
Inkuba song' terura...  
Matena lum'. Vizaĝa pal'  
Kaj sento ve, aŭgura!...

1927 *Teo Kamengradski***Al Botjov**

de M. G. Palmov

Bulgarujo tuta kiel uragano  
Flugas venkofeste al sia Balkano,  
Por prikanti viajn farojn, batalanto,  
Kaj la vundojn por bandaĝi de l' giganto.

Pri vi ĝi legendojn la senmortajn forĝis:  
Ke en la ventegoj la Hero' naskiĝis,  
Alliber' fortrenis li popolon nian,  
Kaj en la ventegoj trovis morton sian.

Trad.: *I. H. Krestanov***Siaspecaj aforismoj**

Gajni amikojn ne estas malfacile, sed  
malfacile estas forpeli ilin.

\*

La mensogo estas arto, la klaĉo estas  
metio, kaj kiu posedas ambaŭ tiujn ar-  
tojn, tiu estas kiel leprulo por la nuna  
societo.

\*

Nenio perfidas la kriman aŭ malĉa-  
stan moron tielsence, kiel la pia esprimo  
de l' mieno kaj la preĝaj okuloj.

\*

Ekzistas nur unu speco de homoj,  
kiuj ne estas en ŝtato starig! sian ali-  
bion — la lunatikuloj.

\*

Estas unu speco de memmortigo,  
kies vera karaktero de memmortigo estas  
malfacile pruvi — tio estas la embuska  
„memmortigo“.

\*

Ricevante subaĉetaĵon, atentu ne  
preni bankbiletojn, ĉar ili estas signitaj:  
preferu arĝenton.

\*

Estante sur la strato, ne rigardaĉu  
tro, ĉar oni povas vin enskribi kiel ate-  
stanton.

\*

Kiu prenas pli multon ol li bezonas,  
tiu estas ŝtelisto. Kiu prenas malpli, tiu  
estas stultulo. Kiu prenas tiom, kiom li  
bezonas, tiu estas la ĝusta homo.

Esp. *I. H. K.*

## Penseroj kaj proverboj

Ne ĉiu gren' semita  
Pan' estas certigita.

\*

Se kore ne donas la mano,  
Al ŝton' similas la pano.

\*

Sufero, homaro, tombaro —  
Jen vera la tera ĉenaro.

\*

Domo sen viro —  
Vivo sen spiro.

\*

Ne fidu maljunulon,  
Sed fidu la spertulon.

\*

Ne timu bojantan hundon,  
Ne mordas ĝi — ne faras vundon.

\*

Enu' se foje vin vizitas  
Kaj vin facile ne evitas,  
Distriĝi vane vi ne penu:  
De laborul' ekzemplon prenu!

1925.

*Teo Kamengradski*

## Orehovo

La kongresurbo.

La nomo de Orehovo devenas de la slava nomo — oreh (nukso). En la ĉirkaŭaĵoj de la urbo iam estis grandaj nuksarbaroj. Sed oni nomas Orehovo ankaŭ Rahovo, kiu nomo estas ŝanĝo de Orehovo aŭ (O)rjahovo. Apogante sin al la antikvaĵoj oni povas kuraĝe diri, ke Orehovo estas malnova urbo. Ĝi ne estas granda, sed ĝi estas belaspekta, simila, laŭ sia situo, al Tirnovo. Preskaŭ ĉiuj gravaj metioj, profesioj kaj ŝtataj institucioj estas reprezentitaj en la urbo. Plej granda komerco estas de cerealoj. Per Danubo ĝi estas ligita ne nur kun la bulgaraj apuddanubaj urboj, sed ankaŭ kun ĉiuj apuddanubaj ŝtatoj, kaj per vagonaro kun tuta Bulgarujo. Nun la urbo estas ĉirkaŭita per ĉarme belaj vinberejoj, en kiuj dum la somero ferias la tuta urbanaro: tage baniĝante en Danubo aŭ fiŝkaptante (nur por plezuro) kaj vespere kantante, kriante kaj gastante unu al la alia en la vinberejaj „kabanoj“. Precipe belaj estas noktoj, kiam estas luno, rebriliĝanta de l' kvieta Danuba supraĵo. En Orehovo, loĝas bulgaroj, turkoj, rumanoj, ciganoj k. a. La loĝantaro estas

tre scivolema, prosperema, gastema kaj tro favora al Esperanto.

Nia movado frue disvastiĝis ĉi-tie de instuisto, sed, post lia transloĝiĝo, ekdormis. Kiam dum 1924 mi fondis la unuan grupeton esperantistan, pure lernanta, nomata „L. L. Zamenhof“, mi eĉ ne songis pri la ekzisto de tri malnovaj esperanto-pioniroj en nia urbo. Eksciante tion, mi tuj invitis ilin refondi novan grupon: de nia „Zamenhof“ kaj la „Guto“ de la liberaj urbanoj. De post la unuiĝo la esperanto-movado en Orehovo ĉiujare prosperadas, la societanoj fervore, sincere kaj akurate agadas kaj jen: klubo, orkestro, kiu vizitis vilaĝojn, kaj finfine „Esperantujo“ — insulo „Esperanto“. Ĉie kaj ĉiuj povas multe konkeri por la movado, sed necesas fervoro, sincero kaj akurateco.

„Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan!“

Orehovo

*N. M. Kocev*

## Insulo „Esperanto“

(Sezonaj skizoj)

**Frua printempo.** Danubo, apenaŭ liberiginta de l' glacia tavolo, brilas kvazaŭ spegulo. De temp' al tempo nur milda venteto sulkigas ĝian glatan supraĵon. Kaj ree kvieto. . . majesta kvieto regas!

Jen — ekfruiĝinta mevo alflugas kriante, jen paro da cignoj, jen aro da babilemaj anasoj kaj ĉiuj ili flugas al insulo „Esperanto“ por trovi siajn malnovajn nestojn. Kaj ĝi — „Esperanto“ — tre atentigas siajn unuajn gastojn. La blanktrunkaj poploj, tremoloj kaj flekseblaj salikoj salute klinas siajn suprojn, ja baldaŭ verdiĝos iliaj branĉoj, baldaŭ birdkantoj eksonos!

En la malproksimo velboato blanka, kvazaŭ cigno sin konturas. Ĝi alproksimiĝas kaj jen, alnaĝas la sablan bordon. Homoj, kun brilantaj pro emocio okuloj, eliras sur la bordon. Ili estas la anoj de la Orehova societo esperantista, venintaj ĉi-tien por revidi sian karan terpecon kaj pristudi la antaŭstarantan porinsul-laboron. Ilia socirango estas malegala, sed mirinde — jen doktoro amike konsiliĝas kun ŝuisto, instruisto kaj laboristo frate ĉirkaŭprenitaj esprimas sian emocion, advokato kaj terkulturisto ĥore kaj kore ekkantas „la Esperon“. la forta spirito de homamo estas sentebla, ia nemezurebla amo al io sankta kaj kara kunfandas ilian socirangan malegalecon kaj kulturan nivelon; ĉi-tie ili estas nur esperantistoj per kies brustoj spiras la amo de la tuthomaro.

Post detala pristudo ili enboatiĝas, ĵetas lastan adiaŭan rigardon al la insulo kaj la remiloj ritme ekplaŭdas forportante la grupeton. Ekkrias ie blanka frutempveninta mevo.

**Varma somero.** Insulo „Esperanto“ svarmas je somerumantoj, iuj baniĝas, aliaj kuŝas sur ia varmigita pura sablo, superŝutataj de la vivigaj sunradioj. Grupeto da bankostumitaj gejunuloj amuziĝas, ludante per pilko. Aro da infanetoj, tute nudaj, kun arĉoj enmane, estas la indiĝenoj-sovaĝuloj, kiuj ĉasas en la „praarbaro“ leonojn. Iliaj korpoj, bruniĝitaj pro la suno, spiras forton kaj sa-

necon. Jen ĉarma knabina voĉo ekkantas akompata de remilplaŭdoj, jen bruarido pro ŝerco ia, jen ravaj kaj revigaj akordoj de gitaro aŭdiĝas por esti postsekvataj de mandolina tremsonado. Kaj la gepatroj ko forte fartante sub la ombro de l' salikaro, trinkas freŝigaĵojn, ĝuas la bonhumoron de siaj infanoj kaj sva-tiĝas. Kaj la verda standardo flirtas super la tegmento de modesta ŝirmdometo — frukto de penplena laboro kaj profetas pri baldaŭa pli bona vivtempo.



Sur la plaĝo de insulo „Esperanto“



Somervigaĵo el la insulo

Vesperigās. Tie-ĉi kaj tie fajregoj ekflamas kaj la ombroj de salikoj kaj homoj ekdancas mistikan, fabelan dancan. Lampiroj, kvazaŭ perditaj fajreroj ekbriletas. Luma strio de falanta stelo trairas la firmamenton. Griloj ekstrilas akompanataj de salikara flustrado. Susuras la ondoj. La tuta naturo kantas . . . kantadas!

Mira Danuba meznokto azilas insulon „Esperanto“.

**Aŭtuno jam regas.** Malvarmetaj ventoj ekblovas pelante la falintajn, velkiĝintajn foliojn. La insulanoj jam estas malmulte. Ili sporte fiŝkaptas, parolas pri bonŝancaj fiŝkaptadoj (imagoj), enpasigās kaj kaptita en la pasinto, fiŝeto farigās centkilogramo siluro. Nur malofte ili kuraĝas demeti la vestojn kaj fari „freŝigan banon“, ja la akvo jam estas malvarma.

Fine ankaŭ ilin la vento forblovas. Nur aro da grupoj kaj sovaĝaj anseroj traflugas celante la foron.

**La vintro venis.** Insulo „Esperanto“

estas sub dika, blanka tavolo da neĝo. Sur Danubo estas portataj de la fluo grandegaj pecoj de glacio, kiuj amasiĝas sur la bordoj de la insulo. Miriga, monstra forto starigas, ludilojn, grandegajn glacipecojn por ke ili tuj estu disrompitaj de aliaj. Neimagebla, timiga krakado kaj bruoj estas aŭdataj. Fine la norda vento frostigas la tutan riveron kaj ĉesigas la batalon de la glacioj. Nun la teruro estas ŝanĝita per ĉarma vidaĵo, precipe ĉe lunbrilo, kiun nur la nordpolusaj esploristoj ĝuis. La sola estaĵo, kiu vagas dumnokte kaj kies postsignoj krosas la neĝon, estas la lutro. Nur malofte, tre malofte, oni vidas tie hompostsignojn. Ili estas de iu verdstelano, pelata de la nostalgio al la kara pec' de ter'!

Tia estas la insulo „Esperanto“ dum la kvar sezonoj de la jaro. Ifoje gasta, milda, alfoje timiga, sed ĉiam „ĉarma“, „Dia“!

Eble ĉar ĝi estas „Nia“!

*Doĉo Dim. — Orehovo*

## Resuma portretaro de la Rahova esperantista gvidantaro

Estimataj gesinjoroj,  
Nun, ja, venas gloraj horoj.  
Konigas mi al „BE“ — legantoj  
La portretojn de l' gvigantoj.  
Ne juĝu laŭ la fizionomioj,  
Ĉar vi havos verportetojn de simioj,  
Hav' interna pli valoras  
Kaj pri ĝi mi parolas.

. . . . .  
Jen unuas: **Georgi Stanev**, eksa nia  
prezidanto,  
Nuna societespero, mon'enkasiganto.  
Tre agema, vigla kaj terure bonhumora.  
(Kasmalplenon atribuas al la krizo  
malfavora).

Li aspiras verdan mondon,  
Esperantan grandan ondon,  
Nur pri tio ĉiam pensas,  
Kiam preĝi li komenĉas.  
Lia devo: La klubejon aerumi  
Sur insulo „Esperanto“ turon fari,

La standardon societatan reverdumi,  
Kaj la staton de la kaso fin' ripari.  
Jen pri kio li nun devas zorgi...  
Tia estas nia „onklo Georgi“.

Dua estas: **Nikola Kocev**, nuna  
prezidanto,  
Instruisto, bravulo kaj lerta muzikanto.  
Li tenas la jungilojn de l' movado  
En nia urb', al brila prosperado.  
Ve, lin trafis sort' terura;  
Komencis revii pri edzino,  
Priploras lin la grupo fraŭla:  
Konsolos ĝin. . . la bofratino.

Tria vicas: **D-ro Georgi pop Ivanov**,  
— vicprezidanto,  
Esperantisto, veterinaro kaj tribun-  
parolanto.  
Ĉasisto pasia.  
(Mi dubas ĉu ne estas ankaŭ pia?)  
Sed certe treege imponi li ŝatas,  
Tuttago per ŝtata fiakro li stratas.

Plus' as kvara: **Asen Georgiev** —  
bibliotekisto,  
Sed biblion li ne ŝatas kiel  
socialisto,

Kaj la biblioteko?  
Sur ĝi estas hipoteko:  
Neniu rajtas librojn peti,  
Neniu sur ĝin manon meti.  
„Kiu legas, tiu pekas“  
Tiel foje li asertas.  
Do, ne ĝenu lin.  
Li, ja, estas jam kaptita  
Kaj eĉ pope edzigita.  
Taskon gravan li nun havas,  
De „senhomiĝo“ mondon savas!

Fine sekvas kvina: **Doĉo Dimitrov**  
— la sekretario,

En lia poŝ' sin trovas la kancelario  
Lia emo estas gitarmuzikadi,  
Kanti falsavoĉe, racion serĉadi.  
Sen li estas, ja, neebla  
La funkcio de l' maŝin'.  
Ole' li estas ŝmirigbla.  
Tias Doĉo Dim'!

**Kontrola Komitato en nuna ĝia  
stato.**

**Ivan Spasov** — advokato,  
De popol' proleta adorato,  
Prizorgadas revizion de la kaso,  
Ĝuon trovas en la klientĉaso.

**Mihal Kraev** — Ko-Komitatano,  
Esperantisto, komercist' kaj vegeta  
rano.

Li havas orajn [dentojn,  
Oran koron.  
Vartas en si purajn sentojn  
Esp. fervoron.

**Veselin Gerĝikov** — solul' senespera,  
Modesto knabina kaj Esp.-ist' sincera.  
Oni aludas, ke edziĝi li volas.  
Tamen mi dubas, ĉu doton li trovos.

Do, mi ĉesas kaj ĉesante,  
Turnas min al vi petante:  
Kongresurbon vi vizitu  
Tuj, rapidu, ne hezitu.

Hotelcimoj jam pretiĝas  
Vin renkonti centobliĝas.  
La „komuna“ estas preta —  
Pajlo kaj kusen' kompleta

Sur insulo „Esperanto“  
Estas ĝojo granda kvanto.  
Eble kuloj nur zumetas,  
Sed ne mordas, mi, ja, vetas.

Senprokraste vi aliĝu  
Tuj! Momente! Revekiĝu!  
Monon ŝparu fastadante  
Ĉiuj al kongres' kantante  
„La Esperon“.

Pri ĉi-fuŝa versofaro  
Kulpas „BE“ — redaktanto,  
Li insistis tujan preson  
Helpu vi, ho, korektanto!

*Doĉo Dim. — Orehovo.*

## P. Jordanov

(biografiaj notoj)

En nia revuo la legantoj vidas la bildon de l' prezidanto de B. E. Asocio — s-ro P. Jordanov. Ĉi-okaze ni donas mallongajn biografiajn notojn pri li.

S-ro Jordanov naskiĝis la 3. VI. 1884 en urbo Veliko-Tirnov, lulilo de II-a bulgara regno kaj ĝia ĉefurbo, kaj lulilo de l' esperantismo en nia patrujo. Unuagradan lernejon li studis en V. Tirnov, kie montriĝis liaj lernemo kaj diligento. Post fino de l' popola lernado li vizitis la realan gimnazion en sia naskurbo ĝis la V-a klaso. En 1899—1900 li estis sendita en la ĉefurbon Sofia por daŭrigi sian stu-

dadon. Tie lia lernemo kaj kapabloj estis tre bone ŝatitaj de liaj instruistoj kaj en la fino de l' jaro li ricevis certigon por la diligenta fino de l' V-a klaso kun plej alta noto. La VI-an klason de l' gimnazio li studis en sia naskurbo kaj la VII-an ankaŭ en Sofia, kie en 1902 li ricevis ateston pri matureco. En 1901 li konatiĝis kun Esperanto. En mallonga tempo li ellernis la lingvon kaj komencis korespondadi kun fremdaj esperantistoj per la adresaro de nia Majstro. La korespondado donis al li eblon perfektigi sian esperantan stilon kaj en 1902 ni vidas



P. JORDANOV

lin kiel sekretarion de l' klubo esperantista „Aŭroro“ en Solio, kies prezidanto estis s-ro N. D. Kovačev kaj estaranoj: Ĥ. Bačevarov, G. Zografski, Bradinov, T. Peev k. a., ĉiuj kun tre alta socipozicio. En tiu tempo krom lia laboro kiel oficisto kaj sekretario de l' klubo, li gvidis kelkajn esperantajn kursojn, donintajn tre fervorajn adeptojn, redaktis la revuon de G. P. Oreškov „Rondiranton“ kaj faris multajn paroladojn propagandajn pri Esp. En la fino de 1905 li forlasis la ĉefurbon kaj iris en la prejgrandan sanktejon de l' balkanaj slavoĵ kiel sekretario de Rilski monastir. En tiu tempo

en V. Tirnovo eklumis radiluma esperanta centro, gvidata de Ĥr. Haralambev, redaktoro de l' revuo samnoma „Lumo“.

Haralambev estis amiko kaj kamarado de s-ro Jordanov kaj lin invitis partopreni la redaktadon de l' revuo „Lumo“. Dank' al sia poeta talento kaj la belegaj kondiĉoj por meditado en la trankvileco de l' granda „Rila Dezerto“, s-ro Jordanov de 1905 ĝis 1913 verkis kaj presigis en „Lumo“ serion da versaĵoj: lirikajn versojn, baladojn k. c., kiel ekz.: „Al V. Tirnovo“, „Soneto“, „Sen Titolo“, „Balado“, „Al buigara patrino“ k. a., ĉiuj tempitaj en freŝa poezio, ŝprucanta



## XXI BULGARA ESPERANTO-KONGRESO

OREHOVO — BULGARUJO

La 22-an — 24-an de julio 1934.

Sub  
protekto  
de la urbestro

**Bulteno**  
**№ 2**

Adreso  
Lo Ko Ko  
Orehovo

Karaj gesamideanoj,

Lo Ko Ko faris kaj faras ĉion eblan por la bona aranĝo de la kongreso, ĉar ĝi havas ambicion organizi veran feston esperantistan kaj kontentigi ĉiurilate la delegitojn kaj la gastojn. Programo — modesta, sed nepre plenumbla kaj kontentiganta la gekongresanojn.

## PROGRAMO

**Sabate** — la 21-an de julio — alveno de la kongresanoj, 21 h. — interkonatiĝa vespero en legejo „Nadeŝda“.

**Dimanĉe** — la 22-an de julio — 10 h. Solena malfermo de la kongreso en la legeja salono. Akcepto de salutoj kaj elekto de kongresa estraro kaj komisionoj. 12 h. — Ekskurso al insulo „Esperanto“. Komuna tagmanĝo sur la insulo (18 h. reveno). 21 h. — Amuzvespero en la urba ĝardeno — speciale ilumunita.

**Lunde** — la 23-an de julio — 9 h. Laborkunsido. 11 h. Prelego. 12 h. — Komuna tagmanĝo (laŭ volo). 14 h. Fakkunsidoj. 15 h. Laborkunsido. 17 h. Ekskurso al la belaj urbaj vinberejoj (Reveno preter Danubo). 21 h. Literatura vespero.

**Marde** — la 24-an de julio — 10 h. Laborkunsido sur insusulo „Esperanto“. 14 h. Laborkunsido (Nedelegitoj amuziĝas, baniĝas, fotografiĝas ktp.). 18 h. Reveno de la insulo. 21 h. Literatura kaj danca vespero.

**Merkrede** — la 25-an de julio — Forveturo de la kongresanoj.

**Notoj.** 1) La tagordo de la laborkunsidoj estas difinita de la Centra Komitato. 2) Lo Ko Ko rajtas ŝanĝi la programon. 3) Kotizo ĝis 1-a de julio — 20 lv., post tiu dato — 30 lv. (Por fremdlandanoj 1 sv. fr. aŭ egalvaloro). 4) Aliĝiiloj akceptataj nur ĝis la 16-a de julio j. k. 5) Nur aliĝintoj rajtas helpon kaj zorgon de Lo Ko Ko (Blinduloj ne pagas kongreskotizon). 6) La kotizo pagebla ankaŭ per bulgaraj poŝt- kaj ŝtat-markoj nedifektitaj. 7) Kiuj deziras komunan loĝejon, tiuj kunprenu litkovrilon. 8) La certigiloj por rabatveturo kaj kongreskartoj dissendotaj post 16-a de julio. 9) La samideanoj el Rusĉuk organizas karavanon al nia kongreso. La gekongresanoj el Varna, Ŝumen, Sviŝtov kaj Bukureŝto uzu la okazon. 10) La rumanaj gesamideanoj sciigis Lo Ko Ko'n, ke ili partoprenos la kongreson multnombre. La samideanoj s-ro Harabaĝiu kaj s-ro Capatana el Bukureŝto prelegos dum la kongreso. 11) Invititaj estas gesanoj Julio Baghy Kolomano Koloĉsay kaj Lidija Zamenhof.

**Lo Ko Ko**

P. S. Ni konsilas la vizitantojn ke ili kunportu bankostumojn.

el nobla kaj amanta koro de l' poeto. En 1914 s-ro Jordanov venis denove en la ĉefurbon kaj studis juron en la ŝtata universitato. En 1918 li estis diplomita kaj post unujara laboro kiel kandidato li en 1919 komencis labori kiel advokato en la ĉefurbo.

En tiu lasta tempo li senĉese interesiĝis pri nia movado, tradukis la versaĵojn „Paisij“ de Iv. Vazov, „Vivas li vivas“ de Ĥr. Botjov, en belega esp. traduko, skribis denove kelkajn versaĵojn, kiuj montras ke lia poeta talento estas ĉiam vigla kaj lia koro sentema al homa suferado kaj malĝojo.

S-ro Jordanov prezidis du esp. kongresojn en Bulgarujo, faris fruktoportan agadon pri Esp., partoprenis la laboron por sendeviga enkonduko de Esp. en la lenrnejoj ĉe ministrado de s-ro St. Omarĉevski kaj tiujare estis unuanime elektita prezidanto de Bulg. Esp. Asocio kaj lastatempe akceptis sur sin la devon de respondeca redaktoro de „Bulgara Esperantisto“ laŭ la postulo de l' nova statuto de la gazetaro.

Li donis ĉion por Esperanto kaj la adeptoj de nia lingvo danke, simpatie kaj kun admiro sekvas lian vojon.

*B. E.*

## Letero de malnova samideano\*)

Vi volas scii ion pri mia modesta personeco. Trookupita per la ĉiutagaj zorgoj,



Sv. Manev

mi nur mallonge povas skribi por kontentigi vin.

Mi naskiĝis la 6-an novembron 1875 en Panagjuriŝte, kie mi finstudis la popolan lernejon. Mezan kaj medicinan kleron mi ricevis en Plovdiv dum 1893—1896.

Por unua fojo mi konatiĝis kun esperanto en 1899, legante la gazeton „Ĵivot“ (Vivo), redaktitan de St. Gidikov en Sliven. Mi tuj havigis al mi rusan esp. literaturon kaj komencis lerni esperanton. En 1899—1900 mi ekkorespondis preskaŭ kun ĉiuj terkontinentoj, kie estis esperantistoj, laŭ la rusa „Adresaro“, eĉ kun multaj insuloj en la Pacifika Oceano. Semajne mi sendis po 3—4 leteroj kaj ricevis respondojn. Mi komencis en 1900 en Sliven la redaktadon de la bulgarlingva biblioteko „Espero“, de kiu aperis nur unu libreto „Iz Esperantovata Kniĝnina“ (El la Esperanta literaturo). Mi ne povis daŭrigi pro multaj kaŭzoj — malsano kaj monmanko. Mi fariĝis tamen fervora propagandisto de esperanto en Bulgarujo. En junaĝo mi estis plena je neelĉerpebla energio kaj altgrada scivolemo. Multajn demandojn de ekonomia naturo, kaj ne malofte ankaŭ de medicina, mi pritraktis kun samideanoj en diversaj lingvoj. Precipe min interesis la

\*) adresita al s-ro I. H. K.



Kotizoj: Ordinara kotizo estas 25:— sved. kronojn.

Frupagantoj (ĝis 31 marto) pagos nur 20:—sved. kr.

Malfrupagantoj (post 1 julio) 30:— kr.

Junuloj (malpli ol 15-jaraj) 5:—kr.

Blinduloj senpage.

Helpkongresanoj (ricevas la kongresajn dokumentojn) 10:—kr.

Donacojn por kongresaj kaj blindula kaso ni danke akceptas.

Kongresejo: Laborkunsidoj kaj fakaj kunvenoj okazas en la sveda parlamenta domo, la solenaĵoj en la koncerta domo, la balo en la urbodomo de Stockholm.

### PROVIZORA PROGRAMO.

Sabate 4 aŭg.: Solena malfermo de la kongreso en la Koncerta domo de Stockholm.

Poste interkonatiĝa vespero en la plej granda restoracio de Stockholm: La salonoj de Berns.

tuberkulozo kaj la lukto kontraŭ ĝi en fremdlando. Same birdobredado kaj abelkulturado, pri kiuj mi verkadis artikolojn en kelkaj gazetoj. Bedaŭrinde, mankis al mi la necesaj monrimedoj por altaj studoj.

Mi bedaŭras ankaŭ, ke mi ne havas submane mian korespondanĵon, kiun tiatempe mi ne alte taksis kaj dissendadis al la komencantaj esperantistoj en Bulgarujo kun propaganda celo. Cetere ne sencele iris mia laboro.

Dum septembro 1929 oni festis sen la oficialaĵoj kaj bruo mian 30-jaran jubileon kiel distrikta helpkuracisto en urbo Kotel, kie mi instaliĝis siatempe kaj restas ĝis nun.

Svetoslav Iv. Manev

**Dimanĉe, 5 aŭg.:** Diservoj divers-specaj en ĉefaj preĝejoj de Stockholm.

Poste mallonaga ekskurso al la bela arkipelago ekster Stockholm.

Vespere koncerto en la Koncerta domo de la fama ĥoraro Dalekarlia sub gvido de la konata sveda komponisto Hugo Alfvén.

**Lunde, 6 aŭg.:** Malfermo de la somera universitato de rektoro Sam Jansson. Famaj sciencistoj svedaj kaj alilandaj jam promesis partopreni. La somera universitato havos du sekciojn: a) pri sveda popolo kaj moroj, b) kun ĝenerala enhavo. (Somera universitato kaj ĉiuj kunsidoj okazos en la sveda parlamenta domo).

Unua kunsido de UEA.

Fakkunsidoj.

Vespere oficiala akcepto de la urba magistrato per solenaĵo en la Blua salono de la Urba domo.

**Marde, 7 aŭg.:** Somera universitato. Kunsidoj. Vespere naciaj dancoj kaj speciala programo en la subĉiela muzeo, la belega Skansen.

**Merkrede, 8 aŭg.:** Somera universitato. Kunsidoj. Vespere teatra prezentado.

**Ĵaŭde, 9 aŭg.:** Tuttaga ekskurso al Upsala, Sigtuna, Skokloster, Mariefred ktp. laŭpalĉe.

Literatura kabaredo.

**Vendrede, 10 aŭg.:** Somera universitato. Kunsidoj.

Vespere internacia balo en la Blua salono de la Urba domo.

**Sabate, 11 aŭg.:** Fermo de la kongreso.

**Fakaj kunvenoj:** Ĝis nun anonciĝis specialaj kunvenoj por: Bahaa-movado, Blinduloj, Esperanto-Institutoj, ILEPTO, Internacia Pacifista Ligo, TAGE, TEJA, TEKA, Vegetaranoj.

**Manĝo:** En Stockholm ekzistas tre multaj popularaj, bonaj restoracioj, kie oni povas ricevi tagmanĝon por 1 sved. kr. En luksaj restoracioj tagmanĝo por 2.50.

La ĉi subaj prezoj enhavas pagon por 7-tagnokta loĝo kaj por ĉiuj trinkmono. La tuta restado dum la kongresa tempo koncerne loĝon estas kovrita per enpago de decidita mono. Sed neniu

manĝo estas enkalkulita. (Matenmanĝo kostas en la hoteloj 1 — 1.25 sved. kr.)

**Loĝo dum 7 tagoj:**

A. Malgrandaj hoteloj, sen fluanta akvo: D. 1. ĉambro unulita 35 — sved. kr. D. 2. ĉambro dulita 70 — sved. kr. D. 3. ĉambro trilita 84 — sved. kr. D. 4. ĉambro kvarlita 112 sved. kr.

E. „Hejmo por virinoj“. Ĉambroj kvarlitaj. Malgranda nombro. Prezo popersone 17.50 sved. kr.

F. Loĝo en diversaj ŝtataj aŭ privataj societoj. Ĉambroj 4- ĝis 6-litaj. Limigita nombro. Prezo popersone 17.50 sved. kr.

G. Loĝo en kazerno. Prezo popersone 11.20 sved. kr.

H. Loĝo en privataj familioj. Prezo popersone 21 — sved. kr.

Loĝej-mendiloj estas sendotaj al ĉiuj kongresanoj dum aprilo.

**Fervoja rabato.**

Ĉiu kongresano ricevas 25% rabaton sur la svedaj fervojoj. La belgaj fervojoj konsentis 35% rabaton.

**Vojaĝkostoj:**

(laŭ informoj de sveda vojaĝoficejo) estas por kongresanoj inter la kongresurbo Stockholm kaj Berlin 47 sved. kr. Budapes 104 sved. kr., Köln 72 sved. kr., Paris 95 sved. kr., Praha 69 sved. kr., Wien 97 sved. kr.

Oni vivas malmultekoste en Stockholm. Speciale favore estas por eksterlandanoj, kaŭze de la valutofalo de la sveda krono. Ekz. 1 sved. kr. = 1 angla ŝil.; 0.24 dol.; 0.70 germ. m.; 0.85 svis. fr.; 0.40 ned. flor.

**La sveda registaro bonvenigas la kongresanojn.**

La sveda registaro, dezirante montri ke ĉiuj eksterlandanoj estas bonvenaj al la Esp.-kongreso, decidis laŭ oficiala letero la 18 majo, ke ĉiuj kongresanoj el ĉiuj landoj ricevos senpagan pasport-vizon dum la kongresa tempo, 29 julio — 15 aŭg. Kaj se kelkaj intencas partopreni la postkongresajn turistekursojn, oni povas havigi plilongigon de la tempo, se oni dum la kongreso tion oficiale petos pere de kongresa komitato.

## Nia vivo

**Sofio.** La 10-an de julio, je la „Maten-festo“ de siaj gelernantoj de franca kaj germana lingvo, kie estis prezentitaj deklamaĵoj, humoraĵoj, kantoj kaj teatraĵoj en tiuj lingvoj, s-ro Krestanov konatigis la publikon pri esp., rakontante la „Muŝoj“-n, kies komprenon montris la kora rido de ĉiuj ĉeestantoj. La venontan jaron li esperas ricevi la oficialan permeson enkonduki ankaŭ esp. en la kursoj por fremdaj lingvoj ĉe la ĉefurbaj lernejoj.

— La 4-an de junio, en plenplena salono de la granda apudpalaca hotelo „Union-Palace“ s-ino Martha Root paroladis pri Bahaismo en esp. — tradukis s-ro Krestanov.

— La popola poeto Jordan Stojanov lernas fervore esp. kun celo popagandian popolkanton en fremdlando, intencante baldaŭ entrepreni mondvojaĝon.

**Ruse.** La societo „Espero“, sub prezido de s-ro Josifov, festis la memoron de Zamenhof per artikoloj en la loka gazetarokaj per paroladoj. Okazis ankaŭ vesper-festo, dum kiu paroladis s-anoj Stanĉev, Ivanov kaj Lazarova, priskribinte la figuron de la Majstro. La kurso estas fermita entuziasme. La kunvenoj okazis

en kafejo „Eks-Radik. Klubo“, str. „Seĥ Svetih“.

— S-ro Ĥr. Stamboliev, del. de soc. „Solidareco“ sukcesis konsentigi la regionan direktoron s-ron B. Kazanliev, ankaŭ samideano, aranĝi kurson de esp. por la policanoj kaj policagentoj, gvidotan de la societa sekretario. Jen laŭdinda kaj imitinda ekzemplo.

**Varna.** Okazis verda semajno kun granda sukceso. Nova kurso, gvitata de s-ano G. Sapunĝiev, laŭ la rekta metodo, kun 30 p. La lokaj gazetoj regule aperigas esp. rubrikojn. Dum la Zamenhova literatura matenfesto s-ro Sapunĝiev legis referaĵon pri la vivo de la Majstro, kaj s-ro Djulgerov — pri la poezia verko de Zamenhov. Ĉiumarde okazas „Rondo Esperantista“ bone vizitata. La kuracloka oficejo dissendas esp. propagandilojn pri la regiono de Nigra Maro.

— Nia samideano Georgi Sapunĝiev presigas libron en bulgara „La mondo en la radioj de la Verda Stelo“, kie li faras detalan revuon de esp. movado en ĉiuj landoj. En la fino de la verko estos listo de bulgaraj kaj fremdlandaj korespondemuloj.

---

### PRI KOMUNA BALKANA LABORO ESPERANTISTA

Konforme je la decido de la XX-a jubilea kongreso de bulgaraj esperantistoj en julio 1933, la B. E. A. sin turnis en aprilo n. j. al s-roj Stamatiadis en Ateno, Jonsescu en Bukureŝto kaj Esp. klubo en Ljubljana, petante komuniki al ĝi, ĉu oni povas organizi ĝeneralan balkanan kunvenon por pritrakti la demandon pri la interkompreno kaj proksimigo de la balkanaj popoloj helpe

de esperanto, samkiel ĉu oni povas renovigi la aperon de la komuna organo „Balkana Konkordo“.

El la ricevitaj respondoj oni povas konkludi kun plezuro, ke precipe la esp. societoj de la tri balkanaj landoj rilatas simpatie al la supremenciitaj demandoj, sed pro manko de monrimedoj ankoraŭ nenia pozitiva laboro estas farebla. Dume ni laboru kaj esperu!

La kongresanoj do estas petataj je la sveda landlimo montri la Provizoran kongreskarton, kaj tiam vi senĝene povos trapasi la landlimon. Kompreneble vi tamen samtempe devos moniri vian pasporton!

### Fervoja rabato en Svedlando

Eksterlandanoj ricevos 25% rabaton sur la svedaj fervojoj dum la tempo 25 julio — 24 aŭg. por vojaĝoj al Stockholm kaj de tie al sveda landlimo.

## Есперантски новини

**Eterna Bukedo** (Въчна Китка) отъ 352 стр. е написалъ видниятъ есперантски поетъ Д-ръ К. Калочай въ Будапеща, издадена отъ *Literatura Mondo* на много хубава хартия. Това сж поеми отъ двадесетъ и два езици, между които отъ български има такива отъ Вазовъ, Михайловски, Величковъ и Ковачевъ, взети отъ Българската Антология на есперанто. Сбирката засужава да краси библиотеката на всѣки есперантистъ.

— **Есперантската литература — бележки и впечатления** — 48 странична брошура на английски отъ есперантския критикъ К. R. C. Sturmer въ Лондонъ. Страницитѣ 39 и 40 сж посветени на България, дето авторътъ най-много хвали „*Bulgara Antologio*“, възхищавайки се най-вече отъ базовия разказъ *Дядо Йоцо гледа* и „*Versaĵoj de Ĥristo Botjov*“, отъ която сбирка много му харесва *Моята молитва* на поета-революционеръ. Като говори за „*Nuntepraĵ galkontoj*“ на Г. П. Стаматовъ, нарича го български Достоевски, а за „*Bulgara lando kaj popolo*“ казва, че е описание на България и нейния народъ.

— **Есперанто въ полето на инженерството** — 35 стр. брошура отъ инж. Т. I. Geritte въ Парижъ, дето на стр. 4 и 9 споменава есперантскитѣ издания *Bulgara Antologio* и *Bulgara lando kaj popolo* на своя български кореспондентъ.

— **Estonta Eduko** (Бждеще възпитание) отъ Ad. Fergière, докторъ по социология, пом. директоръ на Международното бюро по възпитанието. Това е позивъ на есперанто до родителитѣ и възпитателитѣ отъ всички страни за реформиране на училището. Книжката е спретнато 72 стр. издание на ЦЕА въ Женева.

— Въ майския брой на женевския в. „*Esperanto*“ нашиятъ бразилски съидейникъ Braga препоръчва на есперантскитѣ групи и курсове да се снабдятъ съ грамофонни плочи съ

еспер. химни и поезии, които често да пѣятъ и декламиратъ съ въодушевление, което би създадо необходимата подсъзнателна сила за работа много по-ефикасна, отколкото просто четене на книги и списания. Ние можемъ само да се присъединимъ къмъ тоя зовъ за доброто на дѣлото.

— **Международната изложба за търговия и индустрия въ Холандия** е въвела есперанто въ кореспонденцията си и отворила есп. бюро за сведения, домашенъ вестникъ „*Vox-telsche Courant*“ обнародва курсъ и стдѣлъ на есп.

— **Нова Заменхова улица** е осветена на 11 май т. г. въ Тел-авивъ, Палестина, по случай близкоизточния есп. конгресъ и Левантския панаиръ.

— **Есп. курсъ за водачи на чужденци** е откритъ отъ адм. власти въ Копенхагенъ въ услуга на туристическитѣ бюра за пропаганда на датската столица. За сжщото се уреждатъ и есп. сказки.

— **Индокитайскитѣ скаути** ревностно изучаватъ есперанто и приготвяватъ съборъ. Молятъ за изпращане на пропагандични брошури и писма на адресъ: 5-ro T. v. Khas, trapestro, Institut de Recherches Agronomiques, en Saigon (Hindoĉinuĵo).

— **Португалското научно и социално списание „Pensamento“** въ Porto е въвело по две страници на есперанто.

— **Есперанто въ трамваитѣ** на Кьолнъ (Герм.) и Стокхолмъ (Швеция) се препоръчва и закриля отъ адм. власти.

— **Австрийското правителство** е издало нова есп. брошура за Австрия съ много полезни сведения за чужденци, географични карти и купъ художествени илюстрации. Изпраща се безплатно отъ *Fremdultrafika Varbofi-sejo* въ Виена I.

— **Илюстрирани пжтеводни книжки на есп.** сж издали туристическитѣ бюра въ Cannes (Франция) и Oslo (Норвегия); изпращатъ се безплатно при поискване.

— **Бразилската пощенска дирекция** е издала нови официални пощкарти съ с илюстрации и текстъ на есперанто върху адресната страна. Първата серия съдържаше 20, а втората 39 видове съ изгледи отъ разнитѣ щати на Бразилия. Ето още единъ важенъ етапъ къмъ победоносния полетъ на международния езикъ!

— **Югославянското пжтнншко бюро „Putnik“** въ Любляна е въвело есп. въ кореспонденцията си и е издало 4,000 екз. есп. илюстровани проспекти за Словения. Праца се безплатно отъ: Vojađoficejo Putnik, Turševa 1, Ljubljana.

— **Енциклопедическиятъ Еспер. речникъ** на Егени Вюстеръ, отъ който сж излѣзли 4 голѣми тома, ще продължи издаването и на останалитѣ три, ако се запишатъ достатъчно желаещи да го купятъ. Всѣки томъ струва около 500 лева. Поржчки се приематъ отъ голѣмата издателска кжща Ferd. Hirt & Sohn, Esperanto-fako, Leipzig C. 1, Salamonstr. 15, Germanujo.

— **Всемирно известниятъ изобретателъ Маркони** презъ неотдавнашното си посещение въ Япония е говорилъ на банкетъ, даденъ въ негова честь отъ властитѣ и първенцитѣ на Токио, за възможността отъ всемирненъ езикъ, който би се образувалъ съ помощта на радиото. Самъ той, незнаейки японски и принуденъ да говори английски, е съзналъ нуждата отъ международненъ езикъ, който ще послужи за обединението на всички народи въ единъ единственъ блокъ на разбирателство и добра воля.

— **Международната конференция въ Виена** за въвеждане на есперанто въ училищата и практиката е завършила съ голѣмъ успѣхъ. Взели сж участие делегати на разни дружества отъ 25 страни. Била е открита тържествено въ австрийския парламентъ и заседанията сж били едни отъ най-плодовититѣ. Конгресиститѣ сж били приети отъ председателя на републиката, отъ Министъра на нар. просвѣщение и отъ пом. кмета. Взели сж участие много австрийски първен-

ци и дипломатически представители. Всички — и есперантисти и неесперантисти — сж се изказали за по-скорошното всеобщо приемане на межд. езикъ. Повече подробности ще дадемъ въ идния брой.

— **Младежко есп. списание** ще издава г. E. van Veenendaal-Bouwes, en West-Graftdyk (Norda Holando) и моли за изпращане на подходящъ материалъ — оригиналенъ и преводенъ.

— **Есперантски театъръ.** Шведскиятъ режисьоръ Sandro Malmquist решилъ да посети съ своята 15-членна театрална трупа нѣколко европейски страни, за да представи Шекспирови творби. Като единственъ езикъ на представленията артиститѣ сж избрали есперанто.

— **Новиятъ чехословашки епископъ** Д-ръ Антонъ Елчкнеръ е поставилъ есперантската значка — петолъжчната звезда — въ своя епископски гербъ, като символъ на международното братство и миръ. И. Х. К.

---

## Ricevitaj gazetoj

Aŭstria esp., Belga Esp., British Esp., Franca Esp., Intern. Transportlab. Federacio, L' Esperanto, La Juna Batalanto, La Kritika Observanto, Norvega Esp., Pola Esp., La Suda Stelo, Heroldo de Esp., Vegetarano, Verda mondo, Svenska esperanto—Tidningen, La Militrezistanto, Brazila esperantisto, La revuo orienta, Antaŭen, Belga esper., Informilo de Germana esp. Ligo en Ĉeĥosl., Bulteno de inter. sciencia asocio esperant., Svenska Arbetas Esperan., Lingvo internacia, Esperanto en Japanujo, Bulteno de Ĉeĥosl. asocio esperant., Frateco-Sevlievo. Фаръ на въздържането, Свѣтлоструй, Борба съ алкоолизма, Човѣкътъ, Желѣзничарска борба, Итало-Българско списание, Добро здраве, Свѣтъ и наука, Страници за всички, Трезво дете, Трезва младежъ.

---

## Paĝu vian abonon!

## INTERŜANĜO

## KAJ

## KORESPONDANDO

1. S-ro Haivor E. Sorensen, Hojskovhus, Brarun, Danujo.
2. S-ro Pedro Friguls, Str, Industria, № 288-3-2 Barcelona, Hispanujo.
3. S-ro Gunn Nilsson, Fjärås, Svedujo.
4. S-ro Stefano Haraugozó, Pati, Post-Pelis, Hungarujo.
5. S-ino Ida Derbi, 35 Shepherd Street, Bury Lancs, Britujo.
6. S-ro L. E. Smidt, instruisto, Widerwank. A. 65 Nederlando.
7. S-ro Tadeo Skotynski, Rynek, 36, Lwów, Poujo.
8. S-ro Hugo Andersson, Box 2640, Hofors, Svedujo.
9. S-m Hugo Gerisch, Picton — Ontario, Kanado.
10. S-ro Roger Verbulle, 31 rue Jeane Mail St Pol-sur-mer (Nord) Francujo.
11. Silvio Brega, comunuma oficisto via Lazzaretto 3, Lecco (Como), Italujo.
12. S-ro G. Obesnikov, ul. General Stoletov 35, en Stara-Zagora (Bulgarujo).
13. S-ro Stefan Gatev, vilaĝo Karakaŝla, ap. Eski-Ĝumaja (Bulgarujo).
14. S-ro Bratoj Panajotov, vilaĝo Vardun, ap. Eski-Ĝumaja (Bulgarujo).
15. S-ro D. Andreev, Stanimaka (Bulgarujo)

## Bibliografio

(Duoble senditajn esperantaĵojn ni recenzas, unuope senditajn ni nur mencias).

Historia Skizo de UEA 1908-1933 de Hans Jakob, Genève, 1, Tour de l' Ile, Svisujo, paĝoj 110, prezo nemontrita.

Raporto pri la agado de UEA dum jaro 1932, paĝoj 43, sama eldonejo.

Socialismo, ĝia ideologio kaj realigo, de d-ro S. Chazan, eldonejo N. Szapiro, Warszawa, Nowolipki 8, Polujo, paĝoj 47, prezo 0.70 sv. fr.

Pri piedpilkludanto, de Victor Van Nipen, kun desegnaĵoj de St. De Reuder, el la nederlanda tradukis Frater M. Bartolomeus, eldonejo Piet Smits, Korvelscheweg 85, Tilburgo Nederlando, paĝoj 96, luksa eldono, bindita, prezo 1.30 fl.

Bjalistok, Valencia, Ljubljana, Hastigs kaj St. Leonard's. Gvidlibretoj eldonitaj sub aŭspicio de Turisma servo de UEA, Genève.

Zamenhova Esperanto — sub tiu ĉi multparolanta titolo nia bonekonata akademiano, s-ro D-ro Pierre Corret, en Paris 14-e, Boulevard Brune, 197, Francujo, entreprenis studojn pri Esperanto tia, kia ĝi estas en „Fundamento“ kaj en verkoj de D-ro Zamenhof. Dek sinsekvantaj numeroj kostas afrankite nur 5 francajn frankojn per poŝtmandato aŭ 1 svisan frankon per respondkuponoj de UEA.

Ĉiu vorto de tiuj simpatiaj 4-paĝaj folioj estas ĝustaloka kaj mezurita. Kun ĝuo kaj instruo oni legas kaj relegas ilin. Gratulon, amon kaj subtenon pro la kuraĝo diri la veron meritas nia brava samideano Corret! Nur unu rimarkigon li afable permesu al ni: en la adverbaj esprimoj kiel „la plej multe“ kaj „la plej bone“ la aktikolo, laŭ ni — nelatinidaj, estas superflua. I. H. K.

Besa Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj, 12-a eldono, 72 + 28 paĝoj, prezo 1 sv. fr. Eldonis BES, Potstein, Ĉeĥoslovakio.

Iom post iom la eldonaĵo de la Bohema Esp. Servo traboris el si vojon en

**Съчиненията на Джекъ Лондонъ** почнаха да излизатъ и на български. Това сж творенията на най-интересния и най-многочетения по цѣлъ свѣтъ днесъ съвремененъ писателъ и ще бждатъ *най-евтиното и достъпно* за всѣкиго издание: всѣка серия отъ 2-3 тома ще струва само 50 лв. Абонирайте се и изпратете 50 лв. за първата серия на адресъ: сп. „Страници за всички“, ул. „Гурко“ № 20 — София, или искайте подробни покани.

Esperantujo. Zorge eldonita sur bela papero, ĝi enhavas ankaŭ aron da fotografajoj de samideanoj, tiel ke vi tuj povas scii kun kiu vi korespondas. Estus tamen dezirinde, ke la adresoj estu pli bone ordigitaj. Ekz. sub Bulgarujo — Sofia kaj Sevlevo figuras en du diversaj lokoj dum la nomoj de niaj samideanoj estas presitaj kun tri diversaj finaĵoj: v, f kaj ff. Oni preferu la fonetikan transkribon de propraj nomoj (ĉe ni kun finaĵo v), kiel konsilis ankaŭ nia karmemora Majstro.

I. H. K.

— La Praktiko, grandformata gazeto, kiu instruas kaj amuzas, riĉe ilustrita, kun interesaj kaj facilaj legaĵoj. Jarabono 140 Leva. Specimeno senpage! Adreso: La praktiko, Riowstraat 172, den Haag (Nederlando).

— Oomoto Internacia — ilustrita, kultura, literatura kaj vere internacia revuo. Jarabono 5 sv. fr. aŭ 125 Leva. Petu senpagan specimenon! Red. k. adm.: Oomoto Internacia, Kamemoka, Kioio-hu, Japanujo,

Justice et vérité — revuo monata por filozofiaj kaj socialaj studoj en franca lingvo. Jarabono 15 fr. fr. Enhavo tre interesa. Rekomenda. Adreso: Pavillion 22, Cité Jardin, Le Pré-Saint-Gervais (Seine), Francjo.

— El „Bulg. Esperantisto“ — Heroldo de Esp.“ reprenis la versaĵon „Alten“ de d-ro Olsvanger, menciante la fonton.

— „Aŭstria Esp.“ reprenis aron de la „Esp. Vortludoj“ de Iv. H. Krestanov, ne menciante la fonton.

— Ni ĝojas, ke nia organo pli kaj pli plaĉas. Helpu nin, ke ĝi estiĝu pli ampleksa kaj pli interesa gazeto.

— Zlatni Kapki (Oraj Gutoj), rakontoj kaj legendoj de Jordan Kovaĉev, pĝ. 144, prezo 50 Leva, eldonis „Posrednik“, Sofia, 1934.

— Ljubovta na Eva (La amo de Eva), rakontoj de Bonĉo H. Bonev, pĝ. 158, prezo 40 leva, eldonejo „Balgarski Pisateli“, Sofia 1933.

— Blagoslovenata Zemja (La benita tero), nuntempa romano en tri partoj, pĝ. 80, prezo 20 Leva, Sofia, 1933.

Ni varme rekomendas la suprajn verkojn de niaj samideanoj, el kiuj kelkaj

kortuŝaj rakontoj pri la idiliaj kaj honestaj tempoj de l' bona pasinteco (precipe Ŝtelo. La lango de Mateo, la Mirinda, Fabeloj pri la tri koroj, La anĝeloj de avo Niko, Malsato de Kovaĉev kaj Malfeliĉo de avo Stanoja, La kompatinda Paŭlo, Eva de Bonĉo H. Bonev) estas tradukitaj en esp., t. e. legindaj de l' tutmondo.

I. H. K.

S-ro Georgi H. Sapunĝiev, Gradska Biblioteka, Varna (Bulgarujo) presigante en bulgara lingvo broŝuron „La mondo en la radioj de la verda stelo“ aldonos adresaron de esp-istoj en Bulgarujo kaj fremdlando. Ĉiu sendinto de 10 lv. kun sia adreso ricevos ĝin donace.

**Rapidu — Побързайте!** Пишете веднага до редакцията да ви прати следните ценни книги:

„Българска ачтология“ — отлична читанка на esperanto, 250 стр., съ портрети, най добрия помощникъ при усъвършенствуването ви въ международния езикъ и най-хубавия даръ за чуждестранните ви esper. кореспонденти. Отстъпя се на половина цена, т. е. само за 50 лв, включително пощ. разноски.

„Българската Страна и Народъ“ на esp., съ трицвѣтна етнографическа карта, на изчерпване, останали сж само още стотина екземпляри, които се отстъпватъ по 75 лв.

„Двойния esperanto-бълг. и бълг.-ро-esp. речникъ“ — най-пълния до сега, III-то издание, 312 стр., съ основна граматика, се отстъпя на абонатитѣ ни за 55 лв.

А всичките три горни книги само за 175 лв. включ. пощ. разноски и препорџка. Съ наложенъ платежъ 15 лв. повече.

Искайте списъкъ на други esp. книги, списания и значки (кржгли и петолџчни).

**Korekto — поправка**

Въ кн 5-6 на стр. 14, кол. II, вмѣсто Литовското, да се чете Латвийското esp. дружество.

Esperanto-presejo „KULTURA“ — Sofia